

BULTENO de Esperantista Klubo en Brno  
1990/2 (191)

=====

Z mezinárodní ekologické konference letos v lednu v Budapešti vzešlo toto usnesení:

"My, účastníci mezinárodní konference EKOTRANS, zástupci 14 zemí Evropy a Asie, jsme měli možnost přesvědčit se, že esperanto je s úspěchem používáno mezi ochránci životního prostředí různých zemí. Vidíme v tomto národně neutrálním jazyku příslušníků různých národů zásadní podmínku pro demokratizaci, šíření a usnadňování mezindrodních spolupráce ochránců životního prostředí.

Na druhé straně současně je nutno chádnit přírodní a kulturní prostředí člověka. Zachovat různost jazyků a kultur a zároveň zaručit svobodnou mezinárodní komunikaci se stává stále důležitějším úkolem "zelených hnutí". Nejlepší řešení je užívání plánového jazyka jako druhého vedle mateřštiny. Takovým vyzkoušeným jazykem během sto roků je esperanto. Doporučujeme je všem ochráncům životního prostředí k rozsáhlému užívání."

-oOo-

Nové perspektivy pro esperanto v Maďarsku. Po odstranění ruštiny ze škol podrobilo se v posledních letech státní zkoušce z esperanta více než tisíc osob. Esperanto je druhým volitelným cizím jazykem na základních školách od roku 1980, na středních od 1981 a na vysokých od 1985.

75. světový esperantský kongres bude letos v Havaně 14.-21.7. Záštitu nad ním převzal kubánský ministr kultury Dr. Armando Dávalos. Do konce února bylo přes 1100 přihlášených a jsou ohlášeny další větší skupiny z Japonska, Koreje, Polska, Bulharska a Maďarska. K tomuto sjezdu vydala Kuba příležitostnou poštovní známku a také dvě pamětní mince v hodnotě 3 a 30 dolarů.

Ústřední čínská televizní stanice vysílá od 15.5. do 27.10.1990 třikrát týdně kurs esperanta ve formě televizní divadelní hry, která harmonicky kombinuje vyučování se zábavou. Dialogy jsou velmi živé a byla k nim vydána učebnice, tři kazety a videopáska. - Poznámka: Také v naší republice dojde k obnově vysílání v esperantu.

Litevští esperantisté umožnili cestu třem italským novinářům, kteří fotografovali a v reportážích zaznamenali vše, co Litva prožila ve dnech prohlášení své samostatnosti. Dílo má tento název: "Litovio survoje al liberigo" /Litva na cestě k svobodě/.

"La Finna Vojo", dílo o zahraniční politice Finska, napsané dlouholetým finským prezidentem Urho Kekkonenem, bylo přeloženo do esperanta, a obratem z esperanta do maďarštiny, s předmluvou známého politika Imre Pozsgaye.

POLSKO. Cestovní kancelář Esperantotur zahájila novou linku do Německé spolkové republiky. V Bydhošti byl otevřen hotel Esperanto za účasti městské rady, rozhlasu a novinářů.

Počátkem tohoto roku vyšlo v esperantském překladu významné dílo španělské prózy po občanské válce 1936-39, "La familia de Pascual Duarte". Autorem je Camilo José CELA (1916) a překladatelem Fernando de DIEGO (1919). Hlavní část textu má formu poměti sepsaných na počátku roku 1937 pětapadesátiletým Pascualem Duarten, čekajícím na popravu a rekapitulujícím svůj život poznamenaný neštěstím a zlem. Popis, interpretace a literárně historické informace o tomto díle jsou uvedeny ve Slovníku světových literárních děl z roku 1988.

Začátkem tohoto roku byl v Bukurešti úředně zaregistrován znovu-obnovený Rumunský esperantský svaz, jehož novým předsedou se stal universitní profesor Ignat Bociort.

Před deseti roky byl založen v Madridu esperantský pěvecký sbor "Verda Stelo", ve kterém účinkuje 50 zpěváků a zpěvaček a 30 hudebníků. Zúčastnil se s velkým úspěchem mnoha mezinárodních festivalů. Na květen t.r. byl pozván do Volgogradu.

Francouzská rozhlasová stanice AMAURY věnovala esperantu dvouhodinový pořad a televizní stanice FR-3 vysílala velmi živou a pod-

nětnou relaci o esperantu a mládeži.

JUNA AMIKO je malá esperantská revue pro mládež, jejíž obsah potěší a zaujme i dospělé. Má několik tisíc předplatitelů v 33 zeních. Možno ji objednat u Českého esperantského svazu, Jilská 10 110 01 Praha (tel. 220262).

Zhodnocením významu esperanta i úlohy našeho klubu se zabývá Miroslav Malovec v článku uveřejněném v listopadovém čísle časopisu Kam v Brně za kulturou.

Vydavatelství ELBiH v Sarajevě vydalo v esperantu slavnou sbírku básní chorvátského básníka Maka Dizdara (1917-71) "Štona dormanto" /Kamenný spáč/, která získala hlavní jugoslávskou cenu a řadu dalších. Přeložil Jovan Zatković.

Příští světové esperantské sjezdy (nezávisle): 1991 Bergen (Norsko), 1992 Praha, 1993 Valencie (Španělsko), 1994 Soul (Korea), 1995 Tampere (Finsko).

Záhřebský rozhlas má ve svém pořadí "Sljeme" vysílání pro děti, které si děti samy redigují. Od minulého roku jsou na programu témata v esperantu. Řídí je třináctiletá Maja Tišljarová se svými malými kolegy-novináři.

Mezinárodní esperantské prázdniny "Ora Pola Aŭtuno" /Zlatý polský podzim/ se konají již po 26. v Międzygórze v polovině září t.r. Informace: Esperantotur, poštácko 16, PL-50-952 Wrocław, Polsko.

Světový sjezd železničářů-esperantistů se připravuje na příští rok v Brně ve dnech 11.-18. května.

Mezinárodní setkání hudebníků (esperantistů i neesperantistů) bude ve dnech 25.-23.10.1990 v Ostravě. Z bohatého programu: koncerty klasické, rockové a folklórní hudby, vyučování lidovým tancům a písním, videoprojekce, přednášky, autobusové zájezdy do Hukvald a do sklárny v Karolínce. Přihlášky: ARTEMO, Masná 9, 702 00 Ostrava.

Po dvou velmi úspěšných mezinárodních kursech o akupunkturu, které se konaly esperantsky na počátku tohoto roku, budou další dva ve dnech 9.-23.9.1990 v polském Białystoku. Mezinárodní lékařský esperantský svaz a Lékařská akademie v Białystoku zde předvádí velmi účinnou speciální východní léčebnou metodu "Diina Masaĝo".

Esperantisté ve Sverdlovsku připravují opět vydávání revue "La Ondo de Esperanto", která vycházela v letech 1909-17. Plánovaný obsah: sociálně politický život ve východní Evropě, kultura, beletrie, jazykové otázky, kronika hnutí, humor, ilustrace aj. Šest čísel po 32 stranách, předplatné asi 60 Kčs. O zprostředkování byl požádán Český esperantský svaz, Jilská 10, 110 01 Praha (tel. 220262).

Jedním z biskupů, jmenovaných papežem Janem Pavlem II. pro Československo, je monsignore Karel Otčenášek, biskup v Hradci Králové. Je také esperantistou. Studoval filozofii v Římě, vysvěcen byl 17.3.1945 a biskupem se stal 30.4.1951 (bez uznání československého státu). Za komunistického režimu byl žalářován a vypovězen do Litoměřic jako farář. Také českobudějovický biskup monsignore Miloslav Vlk je esperantistou.

#### KATOLÍCI-ESPERANTISTÉ

Po třináctileté přestávce od likvidace sekce katolických esperantistů při Českém esperantském svazu a katolických esperantských táborů příslušníky StB, (proti-)církvním tajemníkem a dalšími mocenskými orgány, obnovují svoji činnost katoličtí esperantisté v Čechách a na Moravě a znovu zakládají sekci katolických esperantistů při ČES a sekci Mezinárodního sdružení katolických esperantistů v Římě (IKUE).

Cílen sekce je šířit esperanto mezi katolíky a využívat ho k šíření radostné zvěsti Ježíše Krista, a to jak v našich zemích, tak i v zahraničí. Za tímto účelem naváže sekce na svou přerušovanou aktivní činnost tím, že bude nejen opět pořádat letní tábory a duchovní naplní a kurzy esperanta, ale také prakticky využívat tohoto dorozumivacího prostředku při organizování různých akcí národního i mezinárodního rázu, umožní svým členům účast na katolických akcích v cizině a zajistí členství v Mezinárodním sdružení katolických esperantistů

v Římě a odběr časopisu "Espero Katolika".

Svou činnost po stránce duchovní náplně bude organizovat zcela ve shodě s církevní autoritou pod odborným vedením kněží-esperantistů a pod patronací otce biskupa Karla Otčenáška.

Ke členství v národní i mezinárodní sekci zve všechny katolické esperantisty, i začátečníky, kteří budou mít možnost své jazykové znalosti doplnit. V příštím roce plánuje také uspořádat jubilejní desátý letní esperantský katolický tábor.

Zájemci o činnost se mohou přihlásit a vyžádat si informace u zemského zástupce IKUE: Miloslav Šváček, Tršická 6, 751 27 Penčice. Prosíme, poinformujte o možnosti stát se členy také ty, kteří sdílejí s námi naše křesťanské i esperantské ideály, ale o této možnosti dosud nevědí.

(Podle Katolického týdeníku 1990/18)

EKOLOGIE NEZNÁ HRANIC /Ekologio ne konas limojn/

Tak zněl oficiální název 68. sjezdu Německého esperantského svazu v západoněmeckém městě Freiburg im Breisgau, 1.-4.6.1990. Na programu bylo téma dnes tak velice aktuální na celém světě: EKOLOGIE. Tento kongres byl tak trochu neobvyklý nejen pro velký počet účastníků ze všech zemí (274), ale také pro své prvenství v účasti po tak obrovských změnách, které se udály ve střední a východní Evropě a které poskytují lidem větší osobní a politickou svobodu.

Zahajovací řeč přednesl Dr. Wolfgang Schwanzer, předseda svazu. Zdůraznil tu skutečnost, že ekologické změny stále více ohrožují život na celé zeměkouli. Znečišťování vody i vzduchu, skleníkový efekt i radioaktivní záření se šíří bez ohledu na hranice států.

Hlavní odbornou a velice obsáhlou přednášku na téma "Ekologie nezná hranic" přednesl Bert de Wit z Nizozemí. Problém životního prostředí je dnes téměř ve všech zemích světa na denním pořádku, řekl.

Československou republiku reprezentovali ing. Vlastimil Kočvara, místopředseda Českého esperantského svazu, a ing. Milan Zvara, předseda Slovenského esperantského svazu. Oba se vyjádřili svým příspěvkem ke stavu ekologické situace v naší zemi.

Sjezd se konal v příjemné a přátelské atmosféře na půdě univerzitního města se 180.000 obyvateli (městem od roku 1120, univerzita založena 1457), s krásnou gotickou katedrálou a mnoha středověkými, ale i moderními zákoutími. Přičteme-li k tomu ještě dvě atraktivní exkurze do švýcarského Baselu a francouzského Colmaru, pak bylo blaho účastníků nanejvýš dovršeno.

(Eva Táborská)

Katolikaj geesperantistoj el Pollando invitas alilandajn katolikojn partopreni en la Internacia Pieda Pilgrimado el Varsorio al Jasna Góra /Hela Monto/ en Częstochowa (la mondfama pilgrimloko) da la 5-a ĝis la 15-a de aŭgusto. La piedpilgrimado havas en Pollando jam preskaŭ trijarcentan tradicion. Pliaj informoj: Z. Kowalski ul. Anielewicza 24/m/1, PL-01-052 Warszawa, Pollando. (HDE 908/2)

EKSJUNULARA RENKONTIĜO. Plenumante sian promeson, renkontiĝis de-nove post 30 jaroj ĉa la statuo de Karel Hynek Mácha eksjunularanoj, la 1-an de majo 1990 en Prago. Ĉeestis: Drapáková, Forman, Kočvara (Drahomír), Křenková, Mařík, Mlejnek, Rychna, Vyhlídka, Zedníková. El la kalifornia San Diego rememoris PhD-ro Jan Neumann, universitata profesoro pri historio.

UNU DEMANDO AL LA FMIĜINTA KANTISTINO NIKOLIN': Kion serĉas profesia kantistino, kiel vi, en Esperanto kaj per Esperanto? NIKOLIN': Per Esperanto mi sukcesis ĝis nun esprimi multajn latentojn de mi mem. Tio danke al la helpo de valoraj kaj afablaj homoj Giorgio Silfer, Perla Martinelli kaj Roger Bernard. Mi menciuj ankaŭ la tradukan helpon de Claude Piron kaj Georges Lagrange. Tiel longe,

kiel Esperanto helpas al mia kvalita kresko, kaj tiel longe, kiel tio efikos pozitive al la kvalita kresko de Esperantio mem, mi klopodos doni nian tutan koron. (Laŭ: HDE 1990/4)

La tradicia triurba renkontiĝo BBB (Brno-Bratislava-Budapeŝto) okazis en la tagoj 1.-3.6.1990 en Brno. Por ne streĉi longe atenton de la legantoj, tuj komence ni anoncas, ke ĝi estis plensukcesa, ekstrema interesa kaj kun granda programo. Partoprenis gesamideanoj el Hungario, Slovakio kaj ĉeĥaj landoj en nombro de ĉirkaŭ 90 personoj. Regis ĝoja kaj amika etoso, okazis reciprokaj gajaj revidoj kaj novaj koraj konatiĝoj. El la programo ni citas: ŝipekskurson sur la digo-lago, tuttagan busan ekskurson al la fama kastelo en Slavkov kun bela parko, viziton al la Napoleona muzeo, al iama batalejo kaj al Monumento de Paco. Post reveno al Brno ni spektis pupteatran prezentadon "Ludo pri Dorotea" en teatro Radost, kiu ricevis pasintjare la unuan premion en la Zagreba festivalo, kaj vespere magiaĵojn de s-ano Rýznar. Dimanĉe projekciado de diapozitivaj pri Brno kaj aliaj moraviaj urboj. Aranĝinto estis Esperantista Klubo en Brno, perfekte la grandan programon preparis s-anino Ing. Jana Burianová, kiu meritas tial ĉies koregajn dankojn.

#### FERIU KUN ESPERANTA LIBRO!

Estas serĉataj materialoj pri la fama blinda rusa esperantisto Vasilij Jakovleviĉ EROŠENKO (1890-1952). Oni petas sendi ilin por la estonta muzea ekspozicio laŭ adreso: Ivan Iljiĉ Prisiajĵuk, Egvekinot ab/k 22, SU-686810 Magadan-provinco. (BE 883/12)

Fraŭlino 17-jara el Bulgario serĉas samaĝulojn por korespondado. Ŝi interesiĝas pri Esperanta, angla, germana, latina kaj hispana lingvoj, naturo, turismo, muziko (klasika kaj moderna), entomologio, fotografio. Plezure ludas pianon, sportas, tradukas en germanan kaj Esperantan, deziras studi medicinon. Jen ŝia adreso: Igljka COKOVA, Centralna poŝta, do poiskvane, 30-6000 Stara Zagora, Bulgario.

#### AL ĈIUJ NIAJ LEGANTOJ NI DEZIRAS SUNAN KAJ BELEGAN LIBERTEMPON!

#### NIAJ JUBILEOJ

La 6.2.1990 ĝisvivis 65 jarojn JUDr. PRAVOSLAV SÁDLO-PÁV, muzika pedagogo, unu el la ĉefaj aktoroj en la «Verda Ĉaro de Julio Baghy».

La 15.2.1990 ĝisvivas 55 jarojn RNDr. VLASTIMIL NOVOBILSKÝ, CSs., docento kaj dekano de Pedagogia fakultato de Karola Universitato (en Ústí nad Labem). Iama aktivulo en la junulara movado, instruisto en la Someraj Esperanto-Tendaroj en Lančov, aŭtoro de "Skizo pri la Esperanta literaturo" (1956).

La 12.3.1990 ĝisvivis 75 jarojn ADOLF STAŇURA, honora membro de ĈEA, aŭtoro de «Propono de Esperanto-stenografio», kunlaboranto de la Pariza "Fluganta Skribilo". kunlaborinto en la Esperanto-elsendoj de Ostrava, tradukinto de romano "La perdita vizaĝo" de Josef Nesvadba.

La 21.3.1990 ĝisvivis gravan vivjubileon EVA SEEMANNOVÁ, honora membrino de ĈEA, poetino, fondintino kaj la ĉefa persono de la renoma "Verda Ĉaro de Julio Baghy" (1954-69), kiu realigis, laŭ intencoj de Baghy, la plej valoran periodon da la Esperanta teatra kulturo. Daŭre aktiva deklame kaj aktore. Kun granda ŝato rememorata en EK Brno pro multaj kulminaj prezentadoj.

La 11.6.1990 ĝisvivis 70 jarojn JIŘÍ KAREN, poeto, gvidanto de la literatura sekcio de ĈEA, premiita ĉe UK en Stokholmo, aŭtoro de pluraj poemaroj,

inter ili dd du esperantigitaj de Jiří Kořínek (Ĉi-apude unu el liaj poemoj.  
Esperantigo de Vladimír Gazda.)

STÁLE SE MÁM NA CO TĚŠIT

Miluji obrazy a knihy  
slova křehouká a svěží.  
Právě mi do schránky  
cinknul dopis.  
Dík za ticho.  
Za dar návštěv.  
Letmá políbení.  
Za malebnou křivku  
tvých paží.  
Kdybych žil tisíc let,  
měl bych se stále  
na co těšit.  
Šedivý život čeká jen  
šedivé lidi.

MI ĈIAM HAVAS KIALON ĜOJI JE IO

Mi ŝatas bildojn kaj librojn,  
vortojn tenerajn kaj freŝajn.  
En mian leterkeston ĵus  
kun tinto falis letero.  
Dankon por la silento.  
Por la donaco de vizitoj.  
Por la kisoj donitaj preterfluge.  
Por la pentrinda linio  
de viaj brakoj.  
Se mi vivus jarojn mil,  
mi ĉiam havus  
je kio antaŭĝoji.  
Griza vivo atendas nur  
grizajn homojn.

La 10.7.1990 ĝisvivos 85 jarojn VUK ECHTNER, unu el la plej gravaj laborantoj por la Esperanto-movado dum jardekoj. Pleje li dediĉis sin al nevidantaj esperantistoj. En la daŭro de 46 jaroj li redaktis ilian revuon "Aŭroro", kiun legas pli ol 600 nevidantoj en 50 landoj. Aŭtoro de lernolibroj por blinduloj kaj kunlaborinto pri la "Ĉeĥoslovaka Antologio".

La 13.7.1990 ĝisvivos 75 jarojn VÁCLAV ŠPŮR, organizinto de la popularaj Someraj Esperanto-Kolegioj en Doksy, honora membro de ĈEA, gvidanto de korespondaj kursoj.

La 37.7.1990 ĝisvivos 85 jarojn VLADIMÍR LERAUS, aktoro de la Nacia Teatro en Prago kaj en la artprogramoj de la Verda Stacio en Brno.

AL ĈIUJ KARAJ KAJ ESTIMATAJ GESAMIDEANOJ  
NIAJN E KORAJN KAJ SINCERAJN BONDEZIROJN.

(Jaroslav Mařík)

EL LA REGIONO DE JÁNOŠÍK  
Hana Messnerová

Tiu ĉi regiono de Slovakio estas bela en ĉiu jarsezono, sed ebla plej pentrinda ĝi estas somere, kiam ĉio, ĉio floras. Ankaŭ arbaroj. Verda nebulo de picea poleno ŝvebas tra la valoj sur bordoj de la arĝentŝaŭma Vrátnanka brilas blindege blankegaj floroj de galantoj.

Kaj Vrátnanka rapidas al la sovaĝa montpasejo Tiesňavy kaj tie muĝas, falas trans kaskadarojn kaj ŝaŭmas. Tiesňavy estas verdire la enira pordego al la reĝolando de Granda Roszutec, kaj ĝia mirakla beleco komenciĝas tuj post la vilaĝo Terchová.

Ĉi tie en Terchová, sur la monteto ĝis nun nomata «U Jánošov», la 25.1.1688 naskiĝis Juraj Jánošík. Tiam estis el tiu regiono mizerega pro la arbitro de feŭdmastroj kaj pro senĉesaj invadoj de Turkoj. Kaj tial ne estas mirinde, ke la homoj forlasadis siajn kompatindajn loĝejojn kaj formis ribelulajn grupojn. Ribelo estis respondo al la krueleco kaj senkompato de la superuloj kaj de riĉiĝantaj negocistoj. Kaj Jánošík, la popola heroo, kiu "de riĉuloj prenadis kaj al malriĉuloj donadis", per tio simple fariĝis motivo de sennombraj rakontoj, legendoj, kantoj, literaturaj verkajoj, dramoj, bildoj, statuoj.

El Terchová (ĉi-loke estas muzeo de Jánošík) kondukas komforta ŝoseeto tra

la sovaĝa kanjono Tiesňavy. Iam ĉi tie estis malmultaj ireblaj vojetoj, laŭ kiuj certe iradis "montaraj knaboj". Ili konis ĉi tie ĉiun ŝtonon kaj angulon; en la montaro la hajdukoj ne havis ŝancon kapti la ribelantojn. Kaj se jes, tiam la kaŭzo estis perfido.

De tiuj tempoj forfluis multe da akvo, la tempoj ŝanĝiĝis, nur la belega naturo restis.

Ni iras plu tra la regiono, proksimiĝas al la vilaĝo Štefanová. Malsupre sur la deklivo paŝtas sin grego da ŝafoj.

"Ĉu urson vi ne renkontis?" demandas nin ŝafisto. - Ni ne renkontis, sed vidis en la kota tereno ĝiajn piedsignojn; jam tio estas travivaĵo. Tiam la homo timeme ĉirkaŭrigardas kaj iras plu vigle kaj atente, kvankam li scias, ke renkontoj kun ursoj ne estas oftaj. Ili estas singardaj, ili preferas eviti homojn. Memkompreneble, kiam iu el inter ili ricevas apetiton je ŝafo, tio estas alia afero, tiam la ŝafistoj havas grandan laboron por forpeli ilin. Ofte daŭras du eĉ tri horojn, antaŭ ol la ursoj malaperas. Kaj dum unu paŝta sezono ili forportas ĉirkaŭ dudek ŝafojn. Ankaŭ dum hela tago.

Kiam ni forlasas la ŝafejon en Podžiar, tiel ŝatata de ursoj, englutas nin la mallarĝa valo Dolné diery kun sovaĝa, muĝanta rivereto. De tempo al tempo, same kiel ĝi, ankaŭ ni saltas trans ŝtonojn kaj malrapide enpenetras en la reĝolandon de montara flaŭro, en la paradizon de botanikistoj kaj amantoj de romantikaj panoramoj.

La valo finiĝas, subite estas ree libera la pejzaĝo kun la blanka preĝejeto en Terchová. Ĝi estas antaŭ ni denove. Pura, belaspekta, gaja vilaĝeto, la malo de tio, kia ĝi estis antaŭe, dum la tempo de Jánošík. Dum la tempo de la legenda ribelulo, kiu onidire, kiam la 18-an de marto 1713 li staris sub la pendumilo, esplorrigardis la amason de rigardantoj kaj ekkriis: "Kiu el inter vi estas el Javorník? Tie ĉe Sankta puto estas enfositaj 16 mansakoj da arĝento..." Onidire anoncis sin neniu. Neniu sciis pri tiu regiono kaj la puto.

Mi tion scias, ofte mi ĉirkaŭiradis, refreŝigadis min per ĝia malvarma akvo kaj rigardis la montaron. Tiu puto estas en ĉiuj lokoj, kie estas herbejoj plenaj de plej belaj floroj kaj raraj plantoj...

(Laŭ: Esperantisto Slovaka 1990/1)

Pardonu, nia kara samideanino Messnerová, ke mi vian artikolon represis sen via scio - ĝi kaptis min per sia poezieco tiel, ke mi ne povis rezisti. Kredeble ankaŭ niaj legantoj trovos en ĝi veran ĝuon. Ĉu vi en tia maniero plu daŭrigos? Mi esperas kaj antaŭĝojas! (j1)

DISTRA PAĜO

- Mi nomiĝas Jozefo Gabrielo. Kaj vi?  
- Mi ne.

- Hieraŭ mi ricevis anoniman leteron.  
- Nekredeble! De kiu?

- Ĉu estas eble starigi en Svislando komunismon?  
- Jes, certe, eblas! Sed estus eterna domaĝo de tiu belega lando!

Ŝi plendis al la kuracisto pri kaploloroj, kaj aŭskultis la konsilon:

- Vi bezonas, sinjorino, distradon por trankviliĝi.

- Ah, vane - aĉumore ŝi mangestas - mi jam provis ĉiamaniere trovi distradon, sed mia edzo estas tiel terure ĵaluza!

- Je la diablo, Paŭlo! Jam la kvinan fojon mi alvokas vin redoni al mi tiujn mil frankojn!

- Ĉu vi miras? Almenaŭ dekfoje mi devis peti, ke vi pruntedonu ilin al mi!

- Pardonu, samideano, vi ŝuldas ankoraŭ al nia grupo kotizon.

- Estas pardonite, samideano!

- Ĉu vi povus malkaŝi al mi la "sekreton de la ĉefkuiristo"?
- Jes. Li amas la kuiristinon...
  
- Kiam nomis vin la procesato unuafoje hipopotamo?
- Antaŭ du jaroj, sinjoro juĝisto.
- Kaj nur nun vi procesas pro tiu insulto?
- Jes, ĉar mi vizitis dum la kongreso la Pekinan zoon.

-----  
Bulteno de Esperantista Klubo en Brno

Aperas ekde la jaro 1952 /Vychází od roku 1952/

Eldonas /Vydává/: Klub esperantistů v Brně, p.přihr. 154, 657 54 Brno

Redaktas /Rediguje/: Josef Vondroušek, Zdeněk Hršel, Jaroslav Lisý

Presas /Tiskne/: Městské kulturní středisko S.K.Neumanna v Brně

Ekspedas /Expeduje/: Adolf Veselý

Por la membroj senpage /Pro členy zdarma/

La finredakto de tiu ĉi numero /Uzávěrka tohoto čísla/: 19.6.1990

Podávání novinových zásilek povoleno Jihomoravským ředitelstvím spojů v Brně,  
č.j. P/3-2982/90, ze dne 7.3.1990